

FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006-PARIS
Sekr.: S-ro R. DESPINEY 43, quai de Champagne 94170-LE PERREUX SUR MARNE
Kasistino: S-ino J. VINCENT B.P.92 27700-LES ANDELYS

c.c.p. Association Catholique Française pour l' Esperanto ROUEN 2324 93 N.

=== la n°: 2,50 F; abono: 8 F; kotizo: 2 F; sume: 10 F. =====

XX

La materialon por la bulteno sendu al S-ino VINCENT antaŭ la 15-a de marto, junio, septembro kaj decembro.

XX

-- N° 111 ---- BULLETIN TRIMESTRIEL ---- TRIMONATA BULTENO -----
*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

=== JANUARO 1977 ===

XX

BILETO DE LA PREZIDANTO.

A tous les membres de notre association, à tous les lecteurs de ce bulletin, nous souhaitons une année 1977 heureuse, active et prospère.
Qu' elle vous apporte, parmi toutes les joies et satisfactions que vous souhaitent vos proches, celle de participer efficacement à la réalisation de notre double objectif:

- Offrir au monde où nous vivons, et plus spécialement aux milieux chrétiens un moyen d' expression permettant de développer les contacts d' amitié, d' entente, de compréhension et d' action commune, par l' usage d' une même langue parlée, écrite, imprimée.

- Etre, parmi les hommes de toutes opinions pratiquant la Langue Internationale, les messagers et les témoins du spirituel, dont la manifestation sera une action pour l' entente universelle et la Paix, celle du Monde, certes, mais aussi celle que Jésus-Christ nous apporte si nous accueillons sa parole.

Il y a beaucoup à faire dans le domaine de la propagation de la Langue Internationale; c' est une conquête de la Presse, de l' Enseignement, de la Radio, des groupes et des mouvements qui est proposée à qui veut y participer: travail individuel ou en équipes, relations personnelles ou démonstrations collectives, tout ceci appelle à l' oeuvre ceux qui veulent s' y consacrer. Les participations les plus modestes, l' action de personnalités influentes, tout doit concourir au résultat. Dans notre cas particulier, une action est à mener patiemment auprès des autorités de l' Eglise, des écoles et des collègues, des groupes de jeunes; action inséparable d' une vie animée par notre foi, et d' une participation selon notre vocation personnelle à la transmission de l' Evangile.

Membres d' une association chrétienne, nous ne devons pas cependant nous enfermer dans un ghetto, mais au contraire militer dans le Mouvement général; cependant l' existence de la FKEA, celle de IKUE se justifient par la nécessité d' affirmer la primauté du spirituel, par tout ce qui nous unit avec tous les membres de l' Eglise, et, au-delà des tragiques divisions des confessions chrétiennes, avec ceux que le sentiment de fraternité en Dieu retrouvé

./....

PROTOKOLO DE LA KONSILIA KUNVENO (5/12/76)

Ĉeestas: S-to DEGRELLE, F-to MARMOU, S-ino VINCENT, F-inoj PREUX kaj VANNEAU, S-roj COLAS, DESPINEY kaj VILLENEUVE.

Petis senkulpigpn: S-to BOURDON, S-ino MICHAU, S-roj BESSIERE kaj VERON.

Nia prezidanto malĝoje anoncas la forpason de sia maljuna patrino. Nia komuna preĝo celas helpi la animon de la mortintino.

FKEA-KONGRESO 1977. Lastan monaton, nia sekretario vizitis la kongresejon en La HOUSSAYE-en-BRIE. Kun F-to MARMOU li starigis provizoran programon, horaron de la vagonaroj, prezojn de restado en la priorejo...

La konsilio decidas pri la aliĝkotiĝoj kaj konsentas, ke aparta programo estu antaŭvidita por la infanoj.

En la venonta konsilia kunveno oni ekzamenos temojn de la debatoj, enhavon de la varietea parto kaj diversajn detalojn por sukcesigi la kongreson.

NIA BULTENO. Nia redaktorino indikas la limdaton por la sendo de la artikoloj (18/12/76). Ŝi ŝatus, ke pli da legantoj partoprenu en la "Lingva angulo". Oni decidas sendi senpage la bultenon al la redakcio de "LE JOURNAL DE LA PAIX".

KANTIKAROJ. El la manoj de S-to DEGRELLE ni ĝoje ricevis la unuajn kantikarojn. Li povis efektiviĝi sian laboron dank' al la tradukoj de nia amiko Roger BERNARD. Oni antaŭvidas vendoprezon de 20 F + 5 F por afranko por kompensi la elspezojn: papero, presado, plasta kovrilo, bindpinĉilo, aŭtorrajtoj...

EKUMENA INFORMILO. Nia sekretario raportas pri la laboro de la komisioneto (A. BACHELIER por KELI, R. DESPINEY por IKUE). La kvarpaĝa informilo estas unuanime aprobita. Alia projekto, de S-to BOURDON, direktita al la junularo, ankaŭ ŝajnas al la konsilianoj bona informilo. Evidentiĝas, ke ambaŭ taŭgas, ĉiu sur sia tereno. Sekve, oni petos la preskostojn por ambaŭ. La malpli kosta estos tiu de S-to BOURDON, ĉar nur dupaĝa. Oni povos unue presigi ĝin.

DISERVO DUM LA LANDA UFE-KONGRESO. La konsilio opinias, ke estus bone organizi ekumenan diservon. Pro tio nia sekretario kontaktos la francan respondeculon de KELI. Oni tralegas la liston de katolikaj esperantistoj de la Grenobla regiono. Espereble, unu el ili povos helpi al ni organizi la diservon.

ESPERANTO-KURSO EN KATOLIKA LERNEJO. S-ro DESPINEY raportas pri la kurso en la lernejo S-ta Jozefo en LE PERREUX. 28 geknaboj vizitas ĝin dufoje ĉiusemajne. Ĉiuj estas ege interesitaj. Krome, la televido TF1 venis por filmi la kurson. La elsendo okazos meze de la unua kvaronjaro 1977.

LITURGIAJ TEKSTOJ. S-to DEGRELLE raportas pri la kunlaboro de S-roj BERNARD kaj WARINGHIEN por disponigi tiujn tekstojn en vere bona Esperanto.

VERKO DE P. KORYTKOWSKI. La verkon, kies titolo estas "INTERNACIA LINGVO EN EKLEZIO KAJ MONDO" tradukas francan nia amiko André RIBOT. Dum nia venonta kunveno, ni pristudos la eblecon helpi al la eldono de tiu rimarkinda libro, kiu plifaciligos la interesiĝon de la ekleziuloj francaj, belgaj, kanadaj, svisaj.

Protokolis Roger DESPINEY.

xx

NIA MEMBRARO.

- Novaj anoj 1977: 1) S-ino VILLENEUVE Jacqueline (Essonne)
- 2) F-ino VILLENEUVE Katerina "
- 3) F-ino VILLENEUVE Karola "

- Novaj dumvivaj membroj: 36) S-ro AMOUROUX Jean (P-O)
- 37) F-ino STAS Armande (S & L)

xx

KONSILIA KUNVENO.

Dimanĉon, la 13-an de marto 1977, je la 14.30, ĉe la UFE-sidejo en Paris
4 bis, rue de la Cerisaie
Iu ajn povas ĉeesti kiel observanto.

kaŭ esperantistoj, kaj ke ankaŭ tie devas esti unueco. Agi en kapeleto kun du, tri amikoj ne alportos multe da akvo al nia muelejo, nek multe da forto al nia movado. Se ni unuiĝus kun la ceteraj esperantistoj el la tuta lando, nome se ni aliĝus al la landa asocio UFE?... Multaj el ni jam tion faras, sed restas tuta bastiono ankoraŭ izolita, malforta. Vi ne havas 70 F por tuta jaro? Pripensu, apenaŭ 6 F por unu monato, eĉ ne 0,50 F ĉiutage! Vere ne? Do, estu minimume simpatianto. Tio kostos al vi nur 17 F... 1,50 F ĉiumonate... Vi certe povas... Kaj vi D E V A S.

Sendu vian kontribuaĵon al la unueco al
ACFE c.c.p. Rouen 2324 93 N. Dankon.

La deĵoranta varbisto.

~~~~~

LA GRACO.

Diris Di' al Israel' per tondro de monto  
kaj multaj diris: simpla tondro.

Diris Di' al Israel' per voĉ' de profetoj  
kaj multaj diris: ja rakonto.

Venis Di' al Israel' en fajrofiguro  
kaj multaj diris: estis brulo.

Venis Di' al Israelo kiel Jesuo,  
kaj multaj diris: ja nur homo.

Kiel Vi, Dio, eniros  
la bunkron de homkranio,  
se ne per streta strio  
de l' Graĉo?

Jeji PODBIELSKI.

~~~~~

EPITAFIO POR MIA TOMBO.

Kiam el ŝton' ĉi eĉ polv' ne restos
kaj pasos via "gloro por memoro",
mi senmortulo ankaŭ tiam estos,
do helpu preĝe al la Dia Koro.

Jeji PODBIELSKI.

~~~~~

LA 37-a KONGRESO DE IKUE

Antaŭkongreso: 9 - 16/8/1977 en Gostyn Poznanski

Kongreso: 17 - 21/8/1977 en Ĉenstoŝova

Postkongreso: 21 - 24/8/1977 en Gora sw. Anny

Postkongreso: 22 - 25/8/1977 en Niepokalanow

Informas: Frateca Informejo Katolika - p. Stanislavo Ruchala, J. Krasickiego 6  
33 - 100 TARNOW POLLANDO

NDLR. Estus bone se multaj FKEA-anoj partoprenus en ĉi tiu kongreso. La loko mem estas vidinda kaj nia ĉeesto multe kuraĝigus niajn polajn fratojn.



KONGRESO DE LA FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO ( FKEA)

\*

LA HOUSSAYE EN BRIE ( Paske) 9/11-an de aprilo 1977

\*

KONGRESEJO: Prieuré St-Martin La Houssaye-en-Brie 77610-FONTENAY TRESIGNY  
tel. 409 41 25

sin turni al F-to René-Jean MARMOU

|                                                   |      |
|---------------------------------------------------|------|
| ALIGKOTIZOJ: individuo                            | 15 F |
| geedza paro                                       | 20 F |
| infano ĝis 16-jara, blindulo, alilandano: senpage |      |
| sacerdoto, religiul(in)o, KELI-ano                | : "  |

LIMDATO DE ALIĜO: 4-an de aprilo 1977

\*

PROVIZORA PROGRAMO

Sabaton 9-an de aprilo:

ekde la 15-a horo: akcepto de la kongresanoj; interkono  
 19.30 : vespermanĝo  
 post la vespermanĝo: unua kunveno

Dimanĉon 10-an de aprilo:

8.00: matenmanĝo  
 9.30: ĝenerala kunveno.  
 12.30: tagmanĝo  
 14.30: kantekezercado (kunporti la kantikaron)  
 16.00: diservo, kuncelebrata de la ĉeestantaj sacerdotoj  
 17.15: debato  
 post la vespermanĝo: dua kunveno

Lundon 11-an de aprilo:

9.30: debato

La infanoj havos eblecon ludi ĉu en la parko ĉu interne. Kiu sin proponas por prizorgi ilin ĉefe dimanĉon?

-----

RESTADPREZOJ

|                                     |      |
|-------------------------------------|------|
| Vespermanĝo:                        | 10 F |
| nokto (kun littukoj kaj tualettuko) | 7 F  |
| matenmanĝo:                         | 6 F  |
| tagmanĝo:                           | 12 F |

--:--:--:--:--:--

NEPRE REZERVU VIAN PASKAN SEMAJNFINON !

venu por vin bani en esperantista kristana etoso !



POR ATINGI LA KONGRESEJON:

de Paris, Orienta stacidomo, linio al Coulommiers ( ĉirkaŭurbo)

| SABATE:  | <u>Paris-Est</u> | <u>Marles-en-Brie</u> |
|----------|------------------|-----------------------|
|          | 13.44            | 14.26                 |
|          | 18.30            | 19.20                 |
|          | 19.38            | 20.21                 |
| DIMANĈE: | 8.37             | 9.22                  |

Aŭtomobilo kondukos vin de Marles-en-Brie ĝis la kongresejo. ( 2 km)

ALIGILO

sendota al F-to R.J.MARMOU Prieuré St-Martin La Houssaye-en-Brie  
77610-FONTENAY TRESIGNY

NOMO KAJ VOKNOMO:

ADRESO:

Mi aliĝas al la kongreso de FKEA kaj pagas kiel kotizon al F-to MARMOU  
c.c.p. Amis des FMC PARIS 5353 03 G la sumon de ..... F

Mi uzos la jenajn servojn:

|                             |        |                              |        |
|-----------------------------|--------|------------------------------|--------|
| sabatan vespermanĝon        | JES NE | dimanĉan vespermanĝon        | JES NE |
| tranoktadon sabaton vespere | JES NE | tranoktadon dimanĉon vespere | JES NE |
| dimanĉan matenmanĝon        | JES NE | lundan matenmanĝon           | JES NE |
| dimanĉan tagmanĝon          | JES NE | lundan tagmanĝon             | JES NE |

Mi proponas la jenajn servojn:

|                           |        |
|---------------------------|--------|
| legadon dum la diservo    | JES NE |
| kantadon                  | JES NE |
| monkolektadon             | JES NE |
| prizorgadon de la infanoj | JES NE |

Mi alvenos la ...-an de aprilo je la .... horo per aŭtomobilo/vagonaro

Mi forveturos la ...-an de aprilo je la .... horo

Mi bezonas .... fervoja(j)n rabatilo(j)n

Bonvolu plenigi unu aliĝilon por ĉiu el viaj familianoj

Uzu samformatan paperon.

Nepre aliĝu antaŭ la 4-a de aprilo 1977.

ĜIS REVIDO EN

LA HOUSSAYE EN BRIE !!!!!!!!!!!!!!!

\* 0 \* 0 \* 0 \* 0 \*

